



JEN



BULTENO DE LA JUNULARO ESPERANTISTA DE NORD-AMERIKO

Numero 5

Januaro 1963

Sendu kotizojn al: S. COHEN, 16 Long Ave., Allston 34, Mass. Ĉion por redakcio kaj ĝeneralajojn al: Junularo Esperantista de Nord-Ameriko, 30 Ave. B, New York 9, N. Y. ---- JARABONO: \$1.00 aŭ egalvaloro.

JEN ALIĜIS AL TEJO

Komence de decembro atingis nin ĝojiga novaĵo: JEN fariĝis oficiala landa sekcio de TEJO.

Pro pluraj kialoj ĉi tiu novaĵo estas grava por ni. Unue, ĝi signifas rekonon flanke de la internacia Esperantista junulara movado; due, ĝi estas ankoraŭ alia fortikiĝo de JEN; trie, niaj kontaktoj kun aliaj landaj sekcioj kaj alia agado donos al ni pli da sperto.

TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) estas la junulara sekcio de UEA. Ĝi fondiĝis jam antaŭ la dua mondmilito kiel sendependa organizo kaj post iom varia historio, en 1957 kuniĝis kun UEA. De tiu tempo ĝi pli kaj pli fortiĝis. Ĝi nuntempe havas sep-membran, tre aktivan estraron; ĝi organizas ĉiujare la Internacian Junularan Kongreson (kiunĉeestas kutime ĉirkaŭ 100 junaj geesperantistoj). Per la aliĝo de JEN ĝi akiris sian 15an nacian sekcion. Inter la naciaj sekcioj (en tri kontinentoj) daŭre okazas interŝanĝo de bultenoj, de konsiloj, ktp. Entute do, TEJO kunligas kaj donas direkton al la agado en la individuaj landoj. Ĝian gravecon por ni oni ne povas troemfazi.

Sed nia aliĝo al TEJO ja ne estas la sola gravaĵo kiu okazis lastatempe. Dum Kristnasko, dum multaj streĉaj horoj, kunsidis nia estraro. Kiujn aferojn ni diskutis? Nu, sufiĉe diversajn. Al John Kooistra ni komisiis prepari unuan skizon de Statuto de JEN; ni longe diskutis niajn planojn por la venonta ELNA-Kongreso en Pittsburgh; ni planis agadon en Kanado, plidiskutis la fondon de Koresponda Servo, komisiis al la sekretario esplori pri fondo de Patrona Komitato.

Entute do, fruktodona ferio! Sed ni ja iome libertempis. Ses el ni kune pasigis la Kristnaskan tagon, komune batalante kontraŭ mirinde obstina meleagro kaj bele internaciumante. Estis inter ni nia fremdula estrarano Humphrey Tonkin el Britujo, Pere Julià, eks-ĉio de la hispana TEJO-sekcio, kaj s-ro Fernando Martinez, kiu profitis la okazon por konversacii (kaj iom argumenti) kun sia opinioplena samlandano.

ATENTIGO AL STUDENTOJ

JEN havas membrojn aŭ kontakton kun studentoj en 14 universitatoj kaj kolegioj tra Usono. Estas jam kluboj en du el tiuj. La Esperanto-Klubo ĉe Harvard havas la plej grandan nombron de membroj (ĉirkaŭ 20). Ĉe Columbia, la klubo ĵus ekkomenciĝis, sed ni esperas, ke ĝi baldaŭ prosperos. Aliloke, iom post iom, Esperantistaj studentoj informiĝas pri JEN, aliĝas, kaj klopodas organiziĝi inter si mem.

Nun, unuafoje, universitato en Usono projektas Esperanto-kurson kiel oficialan parton de sia programaro. Duquesne University, en Pittsburgh, estiĝas pioniro inter universitatoj pro la internacia lingvo. Aliaj sekvu!

--- John Kooistra

Komisiito pri Universitatoj

EKPENSO POR NOVJARO --

La maturiĝo havas tri stadiojn: kiel infano, vi opinias ke vi scias ĉion. Tio estas simpla spertmanko. Iom poste, vi konstatas ke vi scias malmulton, sed iuj aliaj probable scias ĉion. Tio estas la komenco de la edukado. Fine vi trovas, ke nek vi nek iu alia scias ion! Tio estas la komenco de la spirita vivo.

Ni tutkore dankas pro la kartoj kaj bondeziroj ensenditaj dum la Kristnaska sezono!

INTERNACIA KATOLIKA ESPERANTO-JUNULARO en Romo fondita --

Dum la 29a Kongreso de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE) kiu okazis en la "Centro por pli bona mondo" de Patro Lombardi inter la 14a kaj 21a de aŭgusto 1962 kaj kunvenigis 300 esperantistojn el 14 nacioj (pluraj aliaj ne povis veni pro politikaj kaj aliaj malfacilaĵoj) fondiĝis memstara junularsekcio de IKUE sub la nomo "LA ALTA FLUGO" (LAF). Ĉirkaŭ 40 gejunuloj, inter ili eĉ studento el Madagaskaro, diskutis kaj aprobis la statuton de la nova organizo kaj elektis ĝian unuan estraron.

Se ni fetas rigardon al la statuto, ni legas tie sub I 2:

"La celoj de LAF estas:

- a. kolekti la junajn katolikajn esperantistojn al komuna laboro por ilia Eklezio kaj Esperanto.
- b. disvastigi Esperanton inter la katolika junularo.
- c. utiligi la avantaĝojn de la internacia lingvo Esperanto al la LAF-membroj."

LAF estas organizita sur internacia kaj demokrata bazo. La sola oficiale uzata lingvo estas Esperanto.

Laŭstatute la gejunuloj elektis estraron per sekreta voĉdonado. Prezidanto fariĝis s-ro Klaus Perko, studento el Graz, Aŭstrujo. La aliaj kvar estraranoj venas el Nederlando (s-ro H. Weltens), Germanujo (s-ro S. Maul), Italujo (s-ro A. De Salvo), kaj Pollando (f-ino D. Walenzyk). La estraro nomigis reprezentantojn en jenaj landoj: Aŭstrujo, Belgujo, Francujo, Germanujo, Hispanujo, Italujo, Jugoslavio, Kanado, Madagaskaro, Nederlando kaj Pollando. Ĝia spiritalo estas sacerdoto J. Zasas el Pollando. Krome ĝi instalas Centran Oficejon kaj Informan Fakon.

Dum la fondkunveno LAF aprobis du rezoluciojn: unu al la junaj katolikaj esperantistoj, alia al ĉiuj internaciaj kaj naciaj junular-organizoj. Krom tiu fondkunveno la junularo havis jenajn apartajn aranĝojn: prelego de S. Maul, redaktoro de "birdo" (la oficiala organo de LAF), pri "LAF kiel organizo por katolikaj junaj esperantistoj" (tuttaga ekskurso al Cerveteri kaj Bracciano (etruskaj tomboj); laborokunsido, dum oni diskutis pri la Informa Fako, Lingvokampanjo inter la katolika junularo kaj "birdo," kiu aperas jam de post tri jaroj; posttagmeza ekskurso al Tivoli kaj fina Amiza Vespere, per kiu la junularo ĝojigis la plenkreskulojn. Alie la junularo partoprenis la ĝeneralan programon de la kongreso. Ĝi konsistis el papa aŭdienco la 15an de aŭgusto, dum kiu la Sankta Patro speciale salutis la kongreson. Al saluttelegramo li sendis afablan respondon kaj sian Apostolan Benon. Okazis kelkaj prelegoj (interalie pri la rilatoj inter la latina lingvo kaj Esperanto. Pri ĉi tiu temo la kongresanoj aprobis specialan rezolucion), fakkunsidoj de la sacerdota rondo de IKUE kaj de la italaj esperantistoj, diversaj ekskursoj al Romo kaj Assisi kaj du filmvesperoj.

Pro diversaj kialoj oni devis fermi la kongreson jam unu tagon pli frue, tiel ke la televido, kiu volis filmi la solenan fermon, trovis nur kelkajn esperantistojn en la "Centro," kiam ĝi venis.

Patro Lombardi, bedaŭrante ke li mem ankoraŭ ne scias Esperanton, per sia parolado al la kongresanoj en diversaj lingvoj plej evidente pruvis la necesecon kaj taŭgecon de la internacia lingvo.

La protektanto de la kongreso estis la Prezidanto de la Itala Respubliko Antonio Segni; ĝia honora prezidanto estis Kardinalo Ruffini, kiu mem estas esperantisto. Al la honora komitato apartenis pluraj kardinaloj, episkopoj, ministroj kaj eminentuloj.

Entute: neforgeseble kongreso. La 30a Kongreso de IKUE okazos 1964 en Valencia, Hispanujo.

-- Stefan Maul



FELIĈA NOVAĴO



Koran gratulon al du el niaj membroj,
Marcella Fisher kaj James Yuhasz kiuj
estas edzino kaj edzo.

MONDA KULTURO - ĵusaperinta kvaronjara revuo de UEA, redaktata de William Auld: Jarabono 15 ned. gld. (60 steloj). Unua n-ro 32-paĝa.

Tuj abonenda estas tiu ĉi nova kulturgazeto por ĉiuj adeptoj de E-o, kiuj konstatas la fakton de nia rapide kreskanta kaj pliriĉiganta preternacia kulturvivo. Eldonata rekte sub la aŭspicio de UEA, ĝi promesas plej altan atingon rilate enhavon, lingvouzadon, kaj preskvaliton.

Interne de la frontkovrilo troviĝas tiu fabrikmarko de nia beletro, la listo de glosoj. Sed tio ne fortimu la legemulon; ili estas rapide lerneblaj. Sola demando estus, kiel utiligi ilin post eklerno? Ĉu ili apartenas ekskluzive al la legata lingvo? Aŭ ĉu oni povas riski vulgare preparoli ĉiutagaĵojn per beletraj fakterminoj? Kiu scias, ENSENDU!

En la unua, aŭtuna numero de MK aperigis la ege kapabla s-ro Auld tre oportunan kolekton da literaturaj:

• • • Premiitan dramon de M. Boulton, "Nia Sango." Kiel ĉiam, la stilo de f-ino Boulton belegu fluas, kvazaŭ ŝi verkante aŭskultus la vortojn per interna orelo, anticipante eventualan aŭdiĝon sur scenejo. La intrigo celas substreki la neceson de tuja malarmado kaj sekva ĉesigo de atomkernaj provoj. Tion ĝi sukcesas fari ja elokvente. Tamen apud la fino de la drameto f-ino Boulton iĝas nekutime severa kaj akra, iom streĉante la kredopovon, kiam ŝi igas sian ĈEFMINISTRON minaci ekspatriĝon al sia 20-jara, mortonta filino, kiun li supozas eble amas. ~~Misgraŭ tio, la efiko estas - sur mi - larmiga.~~

• • • Novelon de Sándor Szathmári, "Feliĉa Amo," tre bele kaj refreŝige elpensitan. Tio ĉi estas "amrakonto" kun surpriz-finigo, tre humura kaj en iuj lokoj eĉ iomete tristiga pro realismo! Kelkaj germanismoj enŝteligis, sed neniel difektas.

• • • Eseon, "Iuj Karakterizoj de la Poezio," de Edwin De Kock, sudafrika E-a poeto, konata interalie pro sia antologio, "Ombroj de la Kvara Dimensio" (Stafeto, 1961). Supera traktato pri pluraj aspektoj de E-lingva poeziarto, servanta kiel enkonduko por la ĝenerala leganto sur tiun kampon. Kritiko estas preskaŭ ofenda ĉi-okaze; ni ĉiuj preĝu, se tio helpos, ke estos pli da tiaj homoj sinesprimantaj per E-a medio! Tamen ne ĉiuj liaj opinioj estas senrezerve akcepteblaj. En sia postparolo fine de "Ombroj" li ne forgesas papagi tiun nur laŭtradicie pravigeblan teorion, "La poezio devas esti parola arto." Li verŝajne ne volas akcepti la realon, ke tiu tempo estas jam delonge for, kiam poezion oni nature deklamis aŭ kantis. Nuntempe - ĉu bone aŭ ne - la poeziamantoj plejparte legas, ne aŭdas. Kial daŭrigi tiun efemeran idealon? Kial ne agnoski, ke la leganto trovas poemon unue en ĝia surpaĝa formo, kaj ke tiu fakto povas esti prikalkulita de la poeto mem? En ĉi tiu eseo s-ro De Kock plue teorias, sur mi ne scias kia bazo, ke "kiam temas pri la plej intimaj pensoj kaj sentoj, la homo... emas... kvazaŭ aŭtomate al sona harmonio kaj ritmaj elementoj." (substrekoj miaj) Tiu aserto estas absurda. Same lia opinio, ke estas malaprobinda la "forta emo nuntempe konsideri la poezion kiel eĉon sendependan de la formo." Tio ja estus malaprobinda, se tio entute okazus! Sed s-ro De Kock miskomprenas; la "forta emo nuntempe" ne temas pri senforma poezio, sed pri speco de poezio, kiu mem kreas sian formon. Al tio apartenas speciala tekniko, kiu eble iam kondukos al statoj en kiu la figuro kaj ties formo konsistigos sama n procezon.

• • • Redaktoro Auld mem recenzas kvar novajn Stafeto-kajerojn. Nur povas malplaĉi, ke li eluzas tutan duon-paĝon por montri, ke la ekzistado de parodioj kaj pastiĉoj en nia literaturo pruvas maturecon de la lingvo. Kiu opinias alie? Kial aperigi en E-lingva kulturgazeto argumentojn kontraŭ ne-Esperantistoj kiuj ne povos legi ilin? Kaj oni plenrajte povus demandi, kion signifas la koncepto "beletro," se oni inkluzivas "Planlingvaj Problemoj" en tiu kategorio?

• • • La travivaĵo de Mijamoto Masao, "La Kaptito," povas esti la plej ĝuebla enhavaĵo de la tuta numero. Verkite per natura kaj individual stilo, ĝi havas multajn belecojn.

• • • Ege interesajn du artikolojn pri bulgaraj kaj japanaj filmoj, de Metodi Panĉev kaj Mijamoto Masao respektive. Tiu lasta nete taksas la bonkonatan reĝisoron Kurosaŭa Akira. Mi scivolos, kial oni literumas la japanajn nomojn per "y" kaj "w"; ignore al la bona model Comoto? La lingvostilo de s-ro Masao estas iomete kurioza... simile kurioza estas, en la artikolo de s-ro Panĉev, la apudmeto unufanke de la esprimoj "socia opinio," "publika gusto," "aktualaj taskoj" ks. kaj aliflanke la termino "arta realismo," kiun li ekmencias per postpense enŝovita paragrafo. Ĉiu rajtas sian opinion, sed kredeble la artan realismon alimaniere difinus la pligrandparto de la eŭropaj filmfaristoj.

Entute, Monda Kulturo estas tre havenda periodaĵo; ĝi plenigas vakuon lasitan kaj lasotan de pluraj aliaj kulturaj gazetoj, kiuj suferas pro nesufiĉa apogado kaj

povas promesi nur sporadan aperon, kaj ni esperu, ke tiuj samaj talentuloj nun emos koncentrigi sian kapablon al Monda Kulturo, kaj ke aperos ankoraŭ novaj verkantoj sur ties bone flegotaj paĝoj.

LA KOMENCANTOJ DE HODIAŬ ESTOS LA SPERTULOJ DE MORGAU. APOGU I

LETERO AL LA REDAKTANTO (Responde al "Letero al Humanisto," dua

Kara Redaktoro:

Kiel vi scias, mi estas Esperantisto proksimume ses monatojn. Pro tio la vera sento de via letero ne estas facile komprenata de mi. Do, mi donas ĉi tiujn pensojn esperante, ke kion mi skribas, tio trafos vian intencitan sencon.

Estas multaj negravaj punktoj de malkonsento inter ni en via letero. Ankoraŭ estas pli bone nun, trakti nur la pli gravajn punktojn; precipe, "ĝeneralan homon" kaj ateistojn. La unua estas teoria temo sed la dua estas persona ĉar, kiel vi scias, mi estas ateisto, aŭ plibone homaranisto. Mi bedaŭras, ke vi ne opinias bone pri la ateistoj.

Unue, kiam mi parolis pri koncepto de ĝenerala homo, tiam mi intencis paroli pri tiuj aspektoj de la homo, kiuj estas ĝeneralaj, aŭ kiujn havas ĉiuj popoloj komune. Ĉiuj homoj havas korojn, cerbojn, okulojn, orelojn, ktp. Tiuj estas kruda simileco, vere; sed ankaŭ simila spina medolo, simila cerebello, kaj simila frunta cerbo estas malpli da krudeco. Sed kiam oni renkontas amikon, kion oni pensas tiam? Ĉu pri tio, kiel simila estas la nerva konstruo de la korpo? Certe ne! Eĉ plejekstreme oni pensus nur, kiel diferenca estas la staturado aŭ la formo de la kapo. La homo estas tro egoisma por pensi pri simileco. Ĉu ne?

La humileco estas signo de vera scienculo, sed la humileco ne faras scienculon; male, oni fariĝas humilulo per la vero pri si mem.

Sincere,

EGC

Ne demandu, kion la Bulteno povas fari por vi, sed kion vi povas fari per la Bulteno!

--- JFK

LA FILLE MAL GARDÉE (Elprenajfoj) Muziko de Ferdinand Hérold; Aranĝo de John Lanchberry (London Records CM9321; Stereo CS6252)

"La Fille Mal Gardée" (La Filino Malbone Gardata) estas ĉarmega disko de elprenajfoj el la kompleta muzikaĵo de la samtitola baledo.

La historio de ĉi tiu baledo, unu el la plej malnovaj ankoraŭ ekzistantaj, komenciĝis en 1789. La originala muziko devenis de popolkantoj kaj popularaj arioj de tiu epoko. En 1828, Ferdinand Hérold, ĥorestro de la Pariza Opero, aranĝis novan varianton, tenante kelkajn ariojn el la originalo, aldonante aliajn aĵojn el siaj propraj verkoj, kaj depruntante aĵojn de aliaj komponistoj, ekzemple de Rossini. Iom poste, alia varianto kreiĝis, en 1864, kun nova muziko.

En la jaro 1882, du famaj rusaj koreografistoj, Marius Petipa (kiu koreografis "La Dormantan Belulinon" de Ĉajkovski) kaj Lev Ivanov (kiu same faris pri aliaj baledoj de Ĉajkovski kaj por "Coppelia," verko de Leon Delibes) re-enscenigis "La Fille," aldonante muzikon de Delibes, Minkus, Rubenstein kaj aliaj.

Kaj tia ĝi restis. Sed en 1959, Frederik Ashton, koreografisto de la Reĝa Baledo de Anglujo, preparis novan scenaron kaj petis al John Lanchberry pretigi ankaŭ novan muzikon. Kaj en 1960 ĉi tiu plej nova-malnova baldeo prezentigis.

S-ro Lanchberry uzis multan muzikon de diversaj oper-verkistoj, ekz. de Rossini, Donizetti, Hérold; kaj uzis unu arion el la 1864a varianto. Sekve oni povas aŭdi tie ĉi eltiraĵojn el "La Cenerentola" (de Rossini) kaj el "L'Elisir d'Amore" (de Donizetti). Ĉi-lasto, en la aranĝo uzita de Hérold, estis speciale enmetita por la mondfama balerino Fanny Ellsler en Parizo en 1837.

Kiel oni povus diveni, la muziko havas stilon nekonstantan: jen ĉambrekan, jen operekan, jen baledan - sed ĉiurilate tute belan. La unu ario de 1864 eble estas la plej belega elektaĵo.

La orkestro de la Reĝa Operdomo, Covent Gardens, bele kaj brile ludas. La sonkvalito de tiu ĉi bona London-disko estas - riĉa. Kiel la rimarkoj sur la kovrilo asertas, la tuta aĵo estas plena je bonaj arioj kaj havas spiritecon. Oni povas imagi al si la tutan intrigon de l'baledo. Sed eĉ iu, kiu ne konas aŭ ne ŝatas la baledarton, ŝatus kaj povus ĝui ĉi tiun muzikaĵon; unue, ĉar la surkovrilaj rimarkoj bone plenas (pri kaj la muzika kaj la baleda historioj) kaj due, ĉar la disko tiom ravas per si mem.

La menciita kovrilo konsistas el desegnaĵo de Osbert Lancaster, farita laŭ la antaŭdrapa desegnaĵo kiun uzis ĉe sia prezentado la Reĝa Baledo.

"Frederiko," mi komencis, nun por rebati iom tro fortan kondamnon, "Kial, kiam vi volas insulti min, vi ĉiam nomas min aŭ 'burgō' aŭ 'filistro'? Kial ne elpensi ion novan, originalan?"

"Ĉar en vi," respondis li, eĉ pli malaprobe, "Mi vidas la kernon de ĉio abomeninda."

"Nome, kio?"

"Mezklasuleco, manko de progreseco - fi! Vi apenaŭ meritas la titolon 'inteligenta.' Ĉu vi ne scias, ho mizera homspeco, ke se ĉiuj homoj pensus kiel vi, la mondo ĉiam restus la sama?"

"Mi ne ricevis raportojn pri drastaj aliĝoj..."

"Taŭga specimeno, vi. Dum mi strebadas por trovi pli bonan vivon, pli profundan konon, pli vastan scion pri mi mem kaj pri la vera naturo de ĉi mondo, vi sidas trankvile tie eĥante la banalan sentimentalon de Benjamin Franklin, burgō plej altranga."

"Frederiko: nek mi inventis lulseĝon, nek mi portas rektangulajn okulvitrojn..."

"Sed senkadrajn vi ja portas, vidu vin!"

Mi tiutempe kutimis porti senkadrajn okulvitrojn, sed rondajn, por ne aspekti malmoderne.

"Nur ĉar ili malplej pezas, ili tre taŭgas, Frederiko. Kiam mi ŝvitas ili ne defalas, kiel viaj. Konsentite, la viaj iom pli sekvas la modon, kun tiuj dikaj nigraj kadroj, sed ĉu vi ne suferas pro tunelvido?"

"Nur vin infektas tiu malsano. Tamen diru al mi, Ken-la-Senkadra, pri la Bona Vivo! Mi ŝatus aŭdi, kiel 'korekta metodo ellitigi' rilatas al ĉi tiu malluma universo, en kiu ni blinduloj serĉadas Veron!"

Tion Frederiko esprimis kun tiom akra ciniko, kun tiel morda amaro, ke mi pli forte ol iam antaŭe perceptis lian veran senesperecon. Tiu ĉi mia malnova amiko, mi ekvidis, ja vere suferas. Pli serioze mi nun emis paroli.

"Nu, ne miskomprenu min - sed tio estas malbona komenco; vi ne povas ne miskompreni. Ho, se mi nur povus konekti vian cerbon al mia per elektraj dratoj---"

Frederiko eklevis la manon kvazaŭ por defendi sin kontraŭ tiucela alproksimiĝo.

"---Sed tio ne helpus, ĉar vi havas propran ekzistadon. Kiam mia avino mortis, ŝi petis konsilon de mi pri posta vivo. Kion diri? Ni modernuloj tre kuraĝas - dum diskutoj! Sed se vi volas, mi simple rakontos, kion mi mem decidis antaŭ longe."

Mi prepare plikomfortigis min en la seĝo kaj enspiris longan spiron.

"Dum la tuta postrenesanca historio de la homaro..."

"Ho ve!" ĝemis Frederiko.

"...Ĝis nuntempo, kaj la religio, kaj la pura scienco, kaj la filozofio, kaj eĉ la belarto, staris kun la efektiva ĉiutaga vivado en perfekte nenia rilato. La daŭranta religio postulis, ke la homo utiligu unu aron de principoj dum ordinaraĵoj, kaj alian dum specialaj tagoj semajnfine aŭ dum preĝoj. Ĝi postulis, ke la homo kredbaze agnosku implican 'bonon' de la mondotuto kaj aŭ ignoru 'malbonon', aŭ konsideru ĝin nereala, aŭ atribuu ĝin al diabla viglo certe venkota je mondfiniĝo. La konceptoj de la pura scienco siaflanke, malmulte utilis al nefakuloj, krom la psikologiaj, kiuj ankoraŭ restas tiel terure miskomprenataj, ke ili havas nur etan valoron por simplaj homoj -- ĝuste la homoj, kiuj bezonus ilin. En la filozofio, oni pritraktis la hipotezan 'esencon' de objekto, antaŭ ol plene esplori la enkulturan, homan signifon de tiu objekto. La belarto, kiu propre devus ludi tian fismenciitan rolon, daŭre staras ekster la vivspertado de la plimulto, kaj eĉ artamantoj ŝatas fari tiun absurdan dividon inter 'la arto' kaj 'ordinaraj aferoj.' Rigardu la poezion, trafekzemple: veran poezion oni aŭdas ĉiutage de infanoj, kiuj nature amas la sonojn de vortoj. Mi konas maturulojn eĉ, kiuj senkonscie paroladas poezie! Sed ne - tio estas 'literatura' afero! Rezulte, la 'ordinara' vivo restas 'ordinara' kaj la 'arta' vivo restas 'arta.' Oni ĉeestas koncerton, oni vizitas galerion, oni ekhavas religian sperton - sed pro la ŝajna aparteco de tiaj travivaĵoj - morgaŭ estas ĉiam nur alia tago, kaj restas nur la dolĉa memoro."

"Sed," interrompis Frederiko, "Ne ĉiuj homoj havas artan talenton, sekve..."

"Ja preskaŭ ĉiuj! Sed la socio instruas, ke la belarto estas kvazaŭsankta! Tiuj poeziemaj infanoj rapide perdas tiun emon en la lernejoj. Kaj por lerni pentri, ekzemple, oni vizitadas specialan lernejon, kie oni klopodas la vere stultan taskon, instrui al homo sinesprimadon! Dum tiu sama homo esprimadas sin ĉiutage, ĉiel, por vivi!"

"Sed la tekniko..."

"Teknikon oni povas lerni relative rapide. Nur la praktikado de tiu tekniko postulas jarojn. Kaj tio ne estas instruebla. Gravaj antaŭenpaŝoj, cetere, venas per eknovaj teknikoj; kaj en lernejoj, Frederiko, oni ne kutime instruas la novon!"

"Tamen," predikteble elmontris Frederiko, "Oni ne povas fari ion novan, sen plena sciado pri la malnovo."

"Prave. Kun kelkaj esceptoj."

"Estas bone, ĉu ne, ke ni iel apartigu la belarton, por rafini ĝin, por konservi ĝian purecon, por gardi ĝiajn principojn, por ke iu ajn s-ro Ne-Forgesu-Min ne ricevu laŭdon vice de vera kreanto."

"Bonŝance, ke vi levis tion: kiel vi konstatas artan valoron, vidante kreaĵon?"

"Mi komparas ĝin kun aliaj kreaĵoj samcelaj..."

"Jes..."

"Mi konsideras ĝin lokon en la tuta kadro kaj historio de tiu arto, al kiu ĝi apartenas..."

"Jes..."

"Kaj mi juĝas ĝin fine per ĝia efiko sur mi mem."

"Do: la tuta takso dependas de vi kaj kiom vi scias kaj sentas?"

"Kompreneble."

"Kompreneble. Do absoluta takso estas neebla?"

"Prave; sed nun vi komencas imitaĉi tiun platoeskan intervjuadon," li ridis. Nun mia amiko aspektis iom pli gaje, do mi profitis la okazon.

"Do konsekvence," mi preskaŭ kriis, "Kial ne renversi la muron inter la arto kaj la ordinara vivado, neniigi la pompecon de la kritikistoj unufoje por ĉiam, forviŝi la socialklasan meriton de artobjektoj, kaj alpreni veran homan staturon? Jen la Bona Vivo!"

"Aj! Kian specon de bitnikismo vi nun predikas!"

"Ho, ĉu bitniko mi nun estas! Antaŭ kvin minutoj mi estis kultanto de Benjamin Franklin, burĝo plej altranga." Mi solenis. "Ĉu vi vidas harojn sur mia mentono?" mi demandis defendeme. "Eble povus okazi, ke mi lasus mian barbon kreski, ĉar mi tre malŝatas razi min..."

"Ĉiutaga deviga sinkastrado..."

"Jes... sed mi foje provis, nur eksperimente, kaj trafis malbonŝancon."

"Ehe, ĉu ĝi ne kreskis?"

"Ĝi bone kreskis, sed oni ne komprenis en la deforejo kaj maldungis min."

"Domaĝe," moketis Frederiko, "Oni ne komprenis." Nu, malgraŭ via senhara vizaĝo, viaj vortoj tre memorigas min pri bitnika dirmaniero."

(daŭrigota)

KLM

HE, NAIVULINO

He, naivulino, bela pro naiv'
Ĉu tra la klara nokt' vi sekvas min
Por ke mi aldonacu amon?
Ĉu simple, kapranime - nu, proksimiĝu
- Koksoj momente ne svingiĝu -
Kaj mi rigardu vin: ah jes.

Ĉu vi kredas, kolombino - ekvenu do, ekvenu -
Ke mi amatore amas? Ĉu vi konas mian koron?
Ne? Ah ve - vi devos lerni. Ne por konsterni
Vin metie - ne por embarasi vian lerton
Pri l'amoraj artoj mi rakontos
Pri l'poeta vivo. Jes! Poethomidon
Vi mise trovis - sed vi ne malbone fartis!

Mi pagos ne: per eta larmo
Kaj ne tro laŭta korŝirado
Mi eĉ kaptus artan inon ĉi-matene
En kabaretrifuga lando mia. Sed kun vi mi iros
Kun vi laŭeble kavaliros
Por ellogi pli honestan ĝemon el ni du;
Kaj poste - sunleviĝon ni rigardos ie
Ni du, kaj kredeble - ion plu.

KIO ESTAS NOVA?

--- La Francia lernejo lastatempe oficiala ŝanĝis la precipe studotan fremdlingvon de la angla al la germana, dank' al stimulo de la EEK kaj persona prefero de gen. De Gaulle. Tiel ŝanceliĝas nacilingva reganteco!

--- Usona kaj UNa poŝto levos afrankon la 7an de januaro venontjare al 5 cendoj por leteroj kaj 4 cendoj por PK.

--- Nova kasisto de ELNA fariĝis Nov-Jorka s-ano J. FUTRAN: Tamen oni sendu ĉiujn ELNA-kotizojn al s-ro FISHER, 808 Stewart St., Meadville, Pa., kiel antaŭe, NE AL S-RO FUTRAN.

--- Esperanto-kompleto estas preparata de JEN-estraranoj R. KOLLIN kaj J. POOL, por vendado en librotikoj apud universitatoj. Ĝi enhavos nur alt-kvalitan materialon kaj kostos ĉ. \$2.00.

--- Planoj por Nov-Jorka Esperanto-fondaĵo daŭre progresas. Leĝaj manipuladoj postulas zorgon kaj ne tro rapidigitan klopodadon, fare de advokata JEN-ano B. STOLLMAN.

--- JEN-festeton de la 2a de decembro partoprenis entute 20 personoj, ink-e plurajn nemembrojn. Ni aŭskultis sonbendojn de Pola Radio kaj surbendigitan diskuton pri E-o faritan de B. STOLLMAN kaj d-ro J. BÄLBIN. Brodkastis ĝin la stacio de la universitato Columbia. Cetere ni suferis psikologian ekzamenon de studenta membrino L. SHAPIRO, kies konkludojn ni TRE senpacience atendas (eble CED ankaŭ interesigus!). La lastan festeton ĉeestis 28. Generale estis neformala okazo sed prelegis H. TONKIN (pri TEJO kaj la Jaro de la Junularo), B. STOLLMAN (pri publicaj klopodoj kaj la Nov-Jorka E-fondaĵo), kaj J. LEWINE (pri siaj servoj kiel UEA-delegito al alilandaj studentoj en Usono). Tiu renkontiĝo okazis la 23an de decembro; ja estis plena monato!

--- En la lasta n-ro de International Language Review (iom superflua periodaĵo) aperas pluraj interesaj artikoloj pri E-o, rebato al atako de J. CARSTENSEN, adepto de Occidental-Interlingue.

--- Interesa koincido estas, ke dum JEN kuntiradis sin dum la lasta duono de 1962, samtempe francaj gejunuloj reorganizis sian JEFOn (Junulara E-ista Franca

Organizo), kiu distingas sin inter junularoj per prezidantino:

Christiane Garrigue, 34 Rue Vauvenargues, Marseille 7.

Sekr. -Kasisto: J. M. Perrin, Rue Ulysse Pallu, Mont de Marson (Landes)

Eksterlanda Sekr.: Alain Ringotte, 72 Rue J. Michelet, Roubaix (Nord).

Ni pardonpetas al s-anino Christiane, se oni tro ofte aludas ŝian inecon, sed ni ja fieras! JEFO esperas iam havi propran organon, kaj ni aŭdos, kion la francoj havas por diri!

--- Bonkonata avangarda aŭtoro James BALDWIN kurioze mencias Esperanton en sia antaŭlasta libro Nobody Knows My Name (Neniu Scias Mian Nomon) sur paĝo 116. Ne nur la nomon oni ne scias.

--- Nun en la urba telefon-numeraro estas enlistigita sub ESPERANTO nia informa servo, PL 9-0880; ankoraŭfoje dankindas la senkompare agema B. STOLLMAN. Ankaŭ aperas numero sub E-o en la Bostona numeraro: UN 8-6007.

--- En januaro de 1963 komencos Esperanta Scienca Centro, 130 W. 57a Str., salono 6-B, eldoni Esperanto Scientific News, gazeto dulingva, servonta la sciencaj kaj teknikaj intereso.

--- La vidon de sur la supro de la Empire State Building oni nun reklamas en strata fenestro per la jenaj vortoj: wonderlyk, maravilloso, merveilleux, adjaib, vunderlekh, remek, wonderful, puiku, admiravel, wunderbar, maraviglioso, kupaianaha, slicznie, MIRINDA. Tiu lasta fakte aperas pli grandlitera, ol la aliaj. Tamen la listo enhavas unu sufiĉe interesan eraron: kiu povas elmontri la eraron, kaj klarigi, kiel ĝi probable okazis, ENSENDU!! Kaj ni anoncos la solvinton en la venonta n-ro.

--- UEA nomis 1963 "Jaro de la Junularo." Pri la implicaĵoj de tiu decido aperos pluaj informoj en la venonta n-ro de la Bulteno.

DANKON al Esperanto Scientific Center pro uzo de tajpilo kaj ceteraj utilaĵoj.

SKRIBU AL LA REDAKTORO VIAJN OPINIOJN!! FARU ĜIN NUN!

ALIĜU AL UEA
ALIĜU AL ELNA
ALIĜU AL JEN

ESPERANTO TRA ETERO
aŭ, "Radiaparato Kiel Senesperigilo"

Kiam antaŭnelonge mi aĉetis brokantan radiaparaton ekipitan por ricevi radiosignalojn mallongorde elsenditajn el malproksimaj landoj, eĉ mi ne pripensis la eblecon, ke mi povos aŭdi programojn en Esperanto. Jam antaŭ kelkaj jaroj, kiam mi havis similan radiaparaton, mi senesperigis pri aŭdi per la radio Esperantlingvajn programojn. Estis sufiĉe plaĉe povi preni el la etero la sonojn de Londono, Moskvo kaj Tokio; kial ĝenu min neblaĵoj?

Do, mi estis kontenta admiri la sciencon kaj ĝui la elsendojn anglalingvajn el eksterlando. Aŭ, pli precize, mi estis kontenta, ĝis tiam, kiam tralegante malnovan kopion de la revuo Esperanto, mi ektrovis hortabelon, kiu listigis Esperantlingvajn elsendojn el diversaj landoj. Tio vere estis reinstigilo, kaj ne nur propagandilo!

Per mia ricevilo, fabrikita antaŭmilite de kompanio RCA, mi ĝis nun nek estas sukcesinta aŭdi Varsovion, nek Sofion; ili estas tute neaŭdeblaj.

Sukceseton unuan donis al mi Radio Romo. Kvankam ĝi elsendas je tempo nekŝatiga aŭdopovo, kelkaj el ĝiaj programoj (je horo 1255 EST) riceviĝas pli/malpli klare, kaj certe valoras la peno ricevi ilin.

La "Svisa Mallongonda Servado," en Berno, estas pli bone aŭdata. Lastatempe, mi aŭskultis la lastajn minutojn de parolado farita de D-ro Braun; li analizis la konflikton malvarmmilitan pri Kubo. Alia programo temis pri la Esperanta instruado en lernejoj. La paroladon faris Esperanta instruisto svisa.

Aliajn programojn, ekz-e el Brazilo, aŭ Aŭstrio, mi pro diversaj kialoj ne estas aŭdinta. Eble, alia JENano havos pli da sukceso. Vi povas raporti pri tio per la JEN-Bulteno. Multan sukceson!

--- Allan Fineberg

ESPERANTAJ AFEROJ DE PORTLANDAJ GEJUNULOJ

Tri junaj E-istoj de Oregono konstatas ke junuloj samkiel maturuloj povas instrui E-kursojn. S-ro Petro Dvořak de Portlando instruis kurson en loka liceo al kvin interesitoj kaj instruistino de la germana lingvo ĉe Jefferson High School, Portlando. F-ino Jean Troutt komencos sian unuan klason ĉe la Ŝtata Universitato en Corvallis, Oregono. La klasanoj venis el Oregono kaj Kalifornio al la universitato. S-ro Tom Davidson komencos sian sesan klason ĉe la YMCA de la Portlanda urbocentro. Jam en novembro s-ro Davidson kaj membroj de la E-Klubo de Aurora, Oregono, preparis ekspozicion ĉe internacia okazaĵo de la YMCA, kiu rigardis pli ol 2,000 personoj. Li ankaŭ daŭrigos meznivelan kurson en Multnomah en januaro.

F-ino Judy Gardener proponis, ke la junaj E-istoj de Oregono unuigu, okaze de la decembra kunveno de ESPO, Esperanto-Societo de Portlando. Estas 12 fluparolaj E-istoj en Oregono. Se VI havas ideojn pri tia grupo, bonvolu skribi al f-ino Judy Gardener, 2113 NE 60th Ave., Portland 11, Oregon.

Se ekzistas sufiĉa intereso, la junuloj ĉe la unua kunveno, "Pacifika Nord-Okcidenta Esperanto-Kunveno ĉe Mt. Ranier" povus havi kunveneton. Tiucele, ĉiu juna E-isto en la ŝtatoj Oregono, Vaŝingtono, Idaho, Montano, Viomingo, kaj provincoj Brita Kolombio, Alberto, Saskadevano kaj Manitobo skribu al Tom Davidson, 3434 SW Marigold St., Portland 19, Oregon.

--- Tom Davidson

